

Universala Esperanto-Asocio – UEA

- en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko -

Peranto en Germanio: d-ro Wolfgang Schwanzer

Pfarrer-Seeger-Strasse 9, 55129 Mainz

wolfgang.schwanzer@esperanto.de

Universala Esperanto-Asocio estis fondita en 1908 kiel organizaĵo de individuaj esperantistoj. Nuntempe UEA estas la plej granda internacia organizaĵo por la parolantoj de Esperanto kaj havas membrojn en 120 landoj.

La ĉefaj celoj de UEA estas:

- disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto
- agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj
- faciligi la internacian komunikadon
- plifaciligi la spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ la diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo
- kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

UEA laboras en pluraj kampoj:

- **UEA eldonas** la revuon Esperanto kaj librojn kaj posedas libro-vendejon
- UEA organizas jare **Universalan Kongreson** kaj aliajn konferencojn
- UEA **kunlaboras kun gravaj organizoj**: Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Eŭropa Unio, Internacia Organizo por Normigo
- En **kulturo kaj edukado** UEA celas altigi la lingvan nivelon kaj kontribui al internacia kultura interŝanĝo per belartaj konkursoj, internaciaj ekzamenoj, kongresa universitato ktp.
- En la **Delegita Reto** ĉirkaŭ 1600 delegitoj en centoj da landoj ofertas al la membraro personajn servojn: turisman informadon, helpon dum vojaĝoj, respondojn al fakaj demandoj.

UEA ofertas al la individuaj Membroj multajn utilajn servojn, ekzemple:

- La **revuon Esperanto** (11 numerojn/jare) aŭ rete aŭ papere
- Aliron al la unika **Delegita Reto - la reta jarlibro**
- Favorajn kotizojn por **Universalaj Kongresoj**
- Favorajn kondiĉojn por aĉetoj en la **libroservo de UEA**

En la **reto** vi trovas la servojn jen: **www.uea.org**

Dorsflanke via vojo al tiu unika tutmonda komunumo >>>>>>>

Kodo	Membrokategorioj, subtenaj kotizoj, fondaĵoj, abonoj Kotizoj por Germanio 2020	Kotizo	Elekto (skribu la sumon)
MB	Membro Baza ricevas aliron al la reta versio de la revuo Esperanto kaj al la delegita reto (reta jarlibro)	44	
MA	Membro-Abonanto ricevas la servojn de MB kaj paperan version de la revuo Esperanto (11 num/jare)	74	
DMB	Dumviva Membro Baza ricevas la servojn de MB, dumvive	1320	
DMA	Dumviva Membro Abonanto ricevas la servojn de MA, dumvive	2200	
	Membroj en TEJO-aĝo (malpli ol 36-jaraj je la komenco de la kotizata jaro) ricevas ankaŭ la revuon "Kontakto": papere en la kategorioj MA aŭ DMA, rete en la kategorioj MB aŭ DMB. Necesas, ke oni indikas la naskiĝdaton.		
	Kategorioj por junaj membroj (Necesas, ke oni indikas la naskiĝdaton)		
MB (-50%)	Baza Membreco kun 50%-TEJO-rabato (membro estas 20-25-jara je la komenco de la kotizata jaro).	22	
MB (-75%)	Baza Membreco kun 75%-TEJO-rabato (membro ne estas pli aĝa ol 19 jaroj je la komenco de la kotizata jaro)	11	
	Subtenaj kotizoj (aldonaj al la membreco aŭ sen tiu) kaj fondaĵoj		
SZ	Membro de Societo Zamenhof , kiu volas finance apogi UEA. La minimuma kotizo estas duoblo de MA, oni povas pagi pli.	148	
PT	Patrono de TEJO ricevas la paperan revuon Kontakto	88	
DPT	Dumviva Patrono de TEJO same kiel PT, sed dumvive	2640	
FC	Fondaĵo Canuto helpas aktivulojn, kiuj ne povas pagi plenan kotizon	laŭvole	
FVD	Volontula domo subtenas kaj financas la Volontulan Domon	laŭvole	
FBK	Belartaj konkursoj subtenas la Belartajn Konkursojn de UEA	laŭvole	
FA	Fondaĵo Afriko helpas la laboron por disvastigi Esperanton en Afriko	laŭvole	
	Aliajn fondaĵojn vi trovas en la retejo de UEA		
	Abonoj sen membreco en UEA/TEJO		
SA	Simpla Abono por la papera revuo <i>Esperanto</i>	35	
KTO	Abono por la papera revuo <i>Kontakto</i>	25	
	Kompleta sumo		

Mi elektis por 2020 la indikitajn membro-kategorion kaj/aŭ servojn.
La kompletan sumon de _____ Eŭroj mi pagos al la konto de la peranto en Germanio:

Dr. Wolfgang Schwanzer (UEA), Mainzer Volksbank
IBAN: DE03 5519 0000 0400 5790 17 BIC: MVBMD55

Nomoj _____

Strato _____

Poŝtkodo, loko _____

Retpoŝto _____

Dato _____

Subskribo _____

UEA-kodo, se konata

Naskiĝdato _____

Telefono _____

Bv. sendi al: D-ro Wolfgang Schwanzer (UEA) Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
Telefono: Tel 06136-46232
eblas ankaŭ sendi rete (PDF, JPG) Retletero: wolfgang.schwanzer@esperanto.de

Aktualajn informojn vi trovas en www.esperanto-buecher.de